# Staĝo en  Métabief de 20a ĝis 27a de aŭgusto 2022

## Gastejo



« Les Sapins de l'Amitié » (La Abioj de l'Amikeco) estas ĉaledo, kiu kapablas akcepti 80 homojn (grupojn, familiojn…) tutjare.
Ĝi situas en la centro de Métabief, mezmontara skiejo, apud la svisa limo.
La gastiga skipo akceptos vin kaj zorgos pri via restado en 2 ĝis 12-litaj dormo-ĉambroj ĉe la 1a aŭ la 2a etaĝo.
Estas ankaŭ granda teraso kaj ĝardeno (4000 m$^2$)

Nia kuiristo kuiras bonkvalitajn manĝojn kaj proponas adapti-tajn manĝojn laŭeble.

Purigado de la vazaro estas mane farita de la feriantoj mem (amika kaj muzika etoso !).
Same ni bezonos vin por pretigi kaj malpretigi tablojn.
Eblos resti nur kelkajn tagojn.

*Personoj,  kiuj deziras pli da komforto, rezervos  hotelon aŭ alian gastejon.*
*Ili povas nur tagmanĝi kaj vespermanĝi kun la aliaj partoprenantoj en la ĉaledo.*

***Kiel atingi la ĉaledon ?***
Per veturilo : Proksime de Pontarlier
Per trajno : TGV Paris Lausanne, haltejo Frasne, poste de la gare de Frasne, buso ĝis Métabief, 200m de la ĉaledo.

## Agadeblecoj ( decidu je la komenco de la restado)

- Malkovro de la regiono: piede, aŭte... ĝia faŭno kaj flaŭro.
- Akvaj ebloj ĉe la lago de Malbuisson : naĝado, pedalboato, …
- Vizitoj : Fromaĝejo, Château de Joux (kastelo), Naturrezerveja domo de la lago de Remoray, Montara muzeo en La Chapelle des Bois, fonto kaj  akvofalo de la rivero Doubs, Grotoj de Vallorbe, ktp.

## La kursoj de Esperanto

Tri  kursoj estos proponataj.
Kursoj de 9a30 ĝis 12a (kun paŭzo je 10a30) kaj de 17a ĝis 18a30 (laû aktivaĵoj dum la  posttagmezo).

Duontagaj migradoj por malkovri naturon esperante, vizitoj, aŭ aliaj agadoj

Esperanto en Chalonnais

Kontakto : Anne-Marie Ferrier +336 78 45 60
annemarieferrier@orange.fr
aŭ stagemetabief@orange.fr